


# HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, Internacia lingvo



La ĉefplaco de la franca urbo Lillo, kiu okazos la centa  
Universala Kongreso de Esperanto

1  
----- 59-a jarkolekto  
2015



# HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado  
en Hungario

Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

.....  
Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio

Hungara Sekcio

de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Poŝta adreso: HU-1155 Budapest

Rákos út 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000

al eksterlanda adreso: EUR 12

\*

## MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok

központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

„Szkenguru” Nyomda Budapest

Felelős vezető: Balla László

.....  
ISSN 0230-323x  
.....

## ENHAVTABELO:

2. I. Gulyás: La centa
3. I. Gulyás: Sojle de la Nova Jaro
8. J. Halász: Zamenhof memorfesto en Nyíregyháza
10. I. Gulyás: Adiaŭo de János Patay
11. I. Gulyás: Laborplano de IFEF
16. J. Tomísek: El fervoja mondo
18. I. Gulyás: Esperanto, kiel familia lingvo
19. J. Niemann: Stadler FLIRT en Estonio

59-a jaro N-ro 1. JANUARO-MARTO

## LA CENTA

Denove festas la esperantistoj. En ĉi tiu jaro okazos la centa Universala Kongreso de Esperanto en la franca urbo Lillo. Ankaŭ la unua Universala Kongreso okazis en Francio, en la urbo Boulogne-sur-Mer, kaj la estraro de UEA planis organizi ankaŭ la centan UK-on en tiu urbo. La franca LKK ekzamenis la eblecojn en tiu urbo, kaj konstatis, ke la hoteleblecoj, la eventuala kongresejo ne havas tiom da kapacito, kiom estus sufiĉa por organizi la jubilean kongreson. Lillo estas iomete granda urbo, ne estas tro granda distanco de Boulogne-sur-Mer, kaj estas taŭga por tiu kongreso.

Se ni ekzamenas la Universalajn Kongresojn, indas mencii kelkajn indikojn: En Eŭropo okazis ĝis nun 82 UK, en la Amerika-kontinento 9, en Azio 7, kaj en Aŭstralio 1. Mi kiel komitatano „A” de IFEF ĉe UEA ekde 1980 (Stokholmo) partoprenis entute 31 UK-ojn, inter ili 9 ekster Eŭropo. (Kanado: Vancuvero, Ĉinio: Pekino, Kubo: Havano, Sud-Koreio: Seulo, Aŭstralio: Adelajdo, Izraelo: Telavivo, Brazilo: Fortalezo, denove Ĉinio: Pekino kaj Japanio: Jokohamo). Mi havis multegajn interesajn kaj neforgeseblajn travivaĵojn. Mi konatiĝis kun multaj landoj, regionoj kaj urboj, kun diversaj kulturoj, moroj kaj kutimoj, kun multaj homoj ktp. Ankaŭ mem la kongresoj estis interesaj, ĉefe la „Komitatkunsidoj”, „Strategiaj kaj Fakaj Forumoj”, „Terminologiaj Kunsidoj”, „Kongresaj Unuversitatoj”, „Klerigaj Lundoj” k.a. Por partopreni dum tiuj eventoj ĉiam donis al mi novaĵojn kaj interesaĵojn. La plej gravaj eventoj estis por la fervojistoj la „Fervojistaj Kontaktkunvenoj”, dum kiuj multaj fakprelegoj, raportoj, interesaj paroladoj, eĉ fakekskursoj okazis. Kompreneble la kulturaj programoj kaj la ekskursoj estis la kulminoj de la kongresoj. Mi proponas al la fervojistaj esperantistoj por partopreni en la jubilea UK, ĉar verŝajne tio estos inda kaj neforgesebla aranĝaĵo de la grava jubileo.

István Gulyás

# SOJLE DE LA NOVA JARO

Malfacila jaro estas malantaŭ ni. La serio de malsanoj, la malserta financa stato, la malfacilaĵo de la translokiĝo de nia asocio kaj aliaj homaj kaj asociaj problemoj kaŭzis zorgojn en la agado de la hungaraj fervojistaj esperantistoj. Eĉ ne nur en Hungario, sed en la tuta Esperantujo okazis multaj neatenditaj malbonaj eventoj kaj



*Parte de la partoprenantoj*

okazadoj. Kompreneble okazis ankaŭ ĝojplenaj momentoj kaj neforgeseblaj eventoj. Sed ni rigardu laŭvice la okazintaĵojn.

En la komenco de februaro 2015 nia asocio faris ĝeneralan kunsidon, dum kiu ĉiuj gvidantoj de la fakgrupoj (Budapest, Győr, Szombathely, Zalaegerszeg, Kelebia-Kiskunhalas, Nyíregyháza), kaj la prezidantoj de la du membroasocioj (Miskolc, Tata) partoprenis. Mankis la fakgrupo Pécs pro la malbona vetero en tiu regiono, kaj Debrecen pro la ĉeso de la fakgrupo en la fino de 2014. Honorigis nian kunsidon la vicprezidantino de la Hungaria Esperanto-Asocio, kiu certigis al ni la kunvenejon.

La kunsido komenciĝis kun trista evento, ĉar en la antaŭa tago mortis nia plej kara amiko, kaj eminenta esperantisto János Patay. La prezidanto de nia asocio emocie kaj digne taksis la homan kaj esperantan meritojn de János Patay, kaj poste la partoprenantoj kun unu minuta silento memoris pri li.

Unu el la plej grava tagordpunkto de la ĝenerala kunsido estis la raporto de la estraro pri la agado de nia asocio en la jaro 2014. Laŭ la raporto la membro-nombro signife ŝanĝiĝis. Nia asocio havis 471 membrojn kune kun la du membroasocioj (en 2013 tiu nombro estis 524), inter ili 15 IFEF-membrojn (en 2013: 20), 6 fakdelegitojn, 6 individuajn membrojn de UEA kaj 12 dumvivajn membrojn. Se ni ekzamenas la konsiston de nia membraro, ni povas konstati, ke la



*La prezidanto kaj la sekretario*

nombroj de la aktivaj membroj grave malkreskis. En la jaro 2013 tiu membro-nombro estis 158, en 2014 tiu nombro estis 129. La asocio havis 98 emeritulojn (en 2013: 103), lernanton 1 (en 2013: 18) kaj 243 protektantajn membrojn (en 2013: 245). La plej

grava tasko por nia asocio estas haltigi la malkreskon de la membro-nombro, ĉefe en la kadro de la aktivaj membroj kaj lernantoj.

En la pasinta jaro dum la ĝenerala kunsido okazis eksterordinara estrarelekto pro la ŝanĝiĝo de la nombro de la estraro. Tiu elekto estis necesa, ĉar el la kvinmembra estraro demisiis du estraranoj pro malsanoj. Anstataŭ la kvinmembra estraro la kunsido elektis trimembran estraron (prezidanto: István Gulyás, sekretario: D-ro József Bacsárdi, kasisto: D-ro József Halász). La membroj de la Kontrola Komitato de la asocio ne ŝanĝiĝis ( gvidanto: D-ro Imre Ferenczy, membroj: István Sutka kaj Miklós Zuberecz). La nunjara estrara raporto konstatis, ke la plej gravajn taskojn la estraro povis solvi helpe de kelkaj agemaj membroj.



*La sekretario konigas la raporton de la estraro*

En la kadro de la fakgrupoj kaj membroasocioj okazis vigla kaj regula klubvivo kun pluraj lingvokursoj, fakprelegoj, raportoj, eĉ ekskursoj kaj ekspozicioj. Nur tiuj komunaj kunestoj certigas la veran agadon en la Esperanto-movado, kaj logis neesperantistojn por aliĝi al tiu interesa kaj utila organizaĵo. Dum la ĝenerala kunsido la prezidanto informis la deputitojn pri la situacio de la landa kaj internacia Esperanto-movado. Li

akcentis la pozitivan efikon de la nova



*La prezidanto salutas la kunsidon*

agadplano de IFEF, la agadon de la du komisionoj kaj de la establitaj sep laborgrupoj. La ĝenerala kunsido akceptis la raportojn pri la efektivigo de la buĝeto por la jaro 2014 kaj la raporton de la Kontrola Komitato, kaj fine la kunsido akceptis la laborplanon kaj la buĝeton de nia asocio por la jaro 2015. Pro la ŝanĝo de la landaj reguloj la kunsido ankaŭ ŝanĝis la statuton. Finfine la kunsido akceptis la raporton pri la nunjara „Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo”, kiun la membroasocio Tata organizas en la urbo Tata.

La prezidanto konigis la ĉeestantojn pri la translokiĝo de nia centra oficejo, kiun grave helpis VOKE, kiu certigis al ni senpagan luksan ejon, kiu estas taŭga kaj konvena por ni. Dankon al VOKE la helpon.

En la jaro 2014 okazis multaj interesaj eventoj, el kiuj la plej grava estis la 66-a IFEF-kongreso, okazinta en belega apudmara itala urbo San Benedetto del Tronto. Partoprenis ĝin entute 136 geesperantistoj el 19 landoj, inter ili bedaŭrinde nur 4 personoj el Hungario. La komitato traktis multajn tagordpunktojn, el kiuj kelkaj decidoj grave ŝanĝas la praktikon eĉ la vivon de IFEF. Ni devas laŭiri sur tiu vojo, por ke la fervojista Esperanto-movado povu

progresigi al ĝusta vojo. La komitato de IFEF akceptis la novan strategian laborplanon por la jaroj 2014-2016. La komitatoj akceptis la raportojn de la estraro, la ĉefkomitatano kaj la gvidantoj de la Faka Komisiono, aprobis la buĝeton kaj la novajn jarkotizojn, kaj decidis pri la venontaj kongresoj. Dum la kongreso la partoprenantoj aŭskultis altnivelajn fakprelegojn kaj faris ekskursojn en la belega regiono de Italio, eĉ ili ĝuis interesajn kulturajn



*La Kontrola Komisiono raportas*

programojn.

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Sudameriko, en la argentina ĉefurbo Bonaero. En la kongreso partoprenis nur 706 esperantistoj el 57 landoj. Bedaŭrinde fervojistaj esperantistoj ne partoprenis tie, pro tio ne okazis fervojista kontaktkunveno. La aliaj programeroj estis interesaj kaj la partoprenantoj povis ĝui tiujn.

La 46-a Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo okazis en la urbo Győr. Partoprenis 70 personoj, inter ili gasto el Aŭstrio. Multajn interesajn programojn organizis la fakgrupo Győr, kiujn ĝuis la partoprenantoj de la renkontiĝo. La ekskursoj okazis mem en la urbo, ĉar Győr havas nenombreblajn vidindaĵojn, malnovan kaj novan

urbopartojn, tri riverojn, famajn preĝejojn kaj miljaran Bazilikon kaj aliajn konstruaĵojn. Okazis laborkunsido kun ne tro granda intereso, komuna vespermanĝo kun balo kaj tombolo. La aranĝo estis eminenta, kion ĉifoje mi dankas al la organizantoj.

En la pasinta jaro okazis du estrarkunsidoj de IFEF. Bedaŭrinde en la printempa kunsido – okazinte en Francio - mi ne povis partopreni pro mia grava malsano. La aŭtuna kunsido okazis parte en la ĉeĥa urbeto Ĉodov, parte en la ĉefurbo Prago. Ambaŭ estrarkunsido sukcesis bone, kaj la plej gravan temon – la novan agadplanon kaj la ekzamenon de la situacio de IFEF – la estraro longe kaj enprofundiĝe traktis. Multaj gravaj decidoj okazis, kiujn la estraro devas plutrakti en la printempa plivastigita estrarkunsido en Francio. Ĝis tiam la establitaj sep laborgrupoj, kaj la du Komisionoj devas senlace kaj entuziasme agadi.

En la pasinta jaro inter la hungaraj fervojistaj esperantistoj ne okazis mortado, sed bedaŭrinde kelkaj



*La vicprezidantino de HEA alparolas*

eminentaj kaj ŝatataj esperantistoj mortis en Germanio, Norvegio, Svisio, Francio, Ĉeĥio kaj en aliaj landoj, kio donis al ni

korŝirajn perdojn. Ankaŭ ni hungaroj funebras pro la morto de János Patay. Ankaŭ estas malbona afero, ke en la kadro de la fervojista Esperanto-movado grave mankas gejunuloj, pro tio maljuniĝas la IFEF-membraro, eĉ malkreskas jaro post jaro la membro-nombro de nia Federacio. En la lastaj kelkdek jaroj multaj landaj asocioj ĉesis, kiel Anglio, Estonio, Nederlando, Finnlando, Svedio, Svisio, Slovakio, Serbio, Norvegio, kaj apenaŭ agadas kelkaj antaŭe fortaj kaj viglaj landaj asocioj. Tiujn malbonajn tendencojn ne povas ekvilibrigi la nove fondita landa asocio en Kubo. Pro tio ni bezonas novan labormetodon, agadsistemon, propagandon kaj agadplanon. Mi esperas, ke la sep laborgrupoj – helpe de la Faka- kaj Redaktora Komisionoj – trovas la plej taŭgajn kaj efikajn eblecojn



*La prezidanto konigas la buĝeton* por renovigi kaj vigligi la fervojistan Esperanto-agadon.

Alvenis la jaro 2015. Ĉu ĉi tiu jaro kunportos pli bonajn kondiĉojn kaj rezultojn por la Esperanto-movado? Ni ĉiujare esperas, ke la cirkonstancoj pliboniĝas, la homoj rekonas la valoron kaj utilecon de Esperanto. La hungaraj fervojistaj esperantistoj dum la ĝenerala kunsido konceptis la plej gravajn fendaĵojn por la jaro 2015. Inter ili multaj temoj rolas ĉiujare, ĉar tiujn

temojn ni devas kontinue kaj senĉese fari. Kelkaj novaj taskoj kompletigas niajn laborojn, por ke en 2016 la novelektita estraro povu facile transpreni la gvidajn postenojn de nia asocio. Pro tio la ĝenerala kunsido elektis trimembran komitaton, kiu serĉos la plej taŭgajn hungarajn fervojistajn esperantistojn por la estraro. Ankaŭ estas grava tasko por la jaro 2015 la rigore severa mastrumado, ĉar la landa asocio de FISAIC (VOKE) povos certigi nur malmultan financan apogon. La larĝigo de la varbado ankaŭ estas unu el la plej gravaj taskoj, por ke gejunuloj volonte aliĝu al nia asocio. Mi, kiel la nuna redaktoro de nia faka revuo HFM, demisios en la sekva ĝenerala kunsido, ni devas serĉi taŭgan redaktoron, por ke la revuo plu vivu, kaj anoncu la agemon de la hungaraj fervojistaj esperantistoj. Momente en Hungario nur ĉi tiu Esperanto-revuo ekzistas, pro tio ni devas ankaŭ verki artikolojn pri la hungara literaturo, arkitekturo, kulturo, eĉ pri la hungara fervojista kaj nefervojista Esperanto agado.

Kiuj taskoj atendas nin internacie? Per niaj fortoj ni devas subteni la IFEF-estraron por renovigi kaj prosperigi la agadon. Kiuj taskoj atendas la IFEF-on? La estraro, komitato kaj la tuta IFEF-membraro devas haltigi la malaltiĝon de la membro-nombro de IFEF, eĉ la ĉeson de landaj asocioj. IFEF devas stabiligi la buĝeton, fortigi la rilatojn ekstere kaj interne, plibonigi kaj modernigi la informadon, kaj devas modifi la statuton kaj regularon de IFEF. Pro tio IFEF devas organizi tiujn renkontiĝojn (kongreson, estrarkunsidojn, landajn kunvenojn kaj aliajn eventojn), en kiuj la partoprenantoj kuntenas la fortojn, kaj decidas la plej gravaj taskoj.

La plej grava evento de IFEF okazos en la franca urbo Dijon. Tie okazos la printempa estrarkunsido kune kun la franca fervojista Esperanto-kongreso. Kial estas tiu estrarkunsido tiel grava? Ĉar la sekva IFEF-kongreso okazos en Ĉinio, kie atendeble malmultaj komitatanoj partoprenos, kaj la kvorumo ne estos sufiĉa por la voĉdonado. Pro tio IFEF planas organizi plivastigitan estrarkunsidon kun la komitatanoj, por ke la plej gravajn decidojn en Dijon povu finfari.

La alia grava evento okazos en majo en la pitoreska ĉina urbo Kunming, kiu estas la „urbo de la eterna printempo”. Tie okazos la 67-a IFEF-kongreso. Laŭ la programo de la kongreso la partoprenantoj havos multajn fakajn programojn, belajn ekskursojn kaj interesajn kulturajn programojn. Bedaŭrinde pro la tro granda distanco, kaj la alta vojaĝkosto ne tro multaj eŭropaj fervojistaj esperantistoj povos partopreni tie. Tamen – memorigante pri la 58-a IFEF-kongreso, okazinta en 2006 en la ĉina metropolo Sanhajo – ĉi tiu kongreso denove bone sukcesos, kaj la partoprenantoj ĝuos la kongreson.

La alia grava evento estos la 100-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en la franca urbo Lillo, inter la 25-a de julio kaj 1-a de aŭgusto 2015. Mi instigas la fervojistajn esperantistojn por partopreni en tiu jubilea kongreso, kaj organizi fervojistan kontaktkunvenon, kaj se eblas fervojistan fakekskurson. Laŭ la kongresa programo okazos altnivelaj fakaj kaj kulturaj programoj, interesaj ekskursoj, kaj tiu kongreso estos inda propagando kaj plaĉaspekta evento por la tuta mondo. Tiun montras jam la nombro de la ĝis nun aliĝintaj esperantistoj, kiu estas pli ol dumil.

La 47-a Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo okazos en la urbo Tata. La organizantoj jam aranĝis multajn renkontiĝojn, pro kio ili havas spertojn por akiri sukcesojn. Dum la renkontiĝo okazos duontaga ekskurso per urba trajneto al la fortikaĵo Tata, kiu situas apud la granda lago. La organizantoj planas tuttagan ekskurson per speciala aŭtobuso al la fama urbo Esztergom, kie la partoprenantoj vizitos la Bazilikon, postrestaĵojn, trezorejon kaj



*La prezidento respondas*

aliajn vidindaĵojn. En Esztergom okazos komuna tagmanĝo, kaj poste per trajneto ni vizitos la transdanuban slovakon urbon Sturovo (Párkány). Dimanĉe antaŭtagmeze okazos oficiala konferenco pri aktualaj temoj de la Esperanto-movado. La loĝejo estos en junulara gastejo kaj en hotelo. Do ĉiun eblecon disponas la organizantoj por ĝui la tritagan renkontiĝon.

Nia ĝenerala kunsido aprobis la laborplanon por la jaro 2015, kiu enhavas multajn taskojn kaj solvendajn problemojn. Mi esperas, ke la formulitaj taskoj, la decidoj de la deputitoj, la agemaj fervojistaj esperantistoj helpas solvi la entreprenitajn taskojn, kaj al tio kontribuas la landa asocio de FISAIC (VOKE) per financa apogo kaj per idea subteno de nia agado.

**István Gulyás**

# ZAMENHOF MEMORFESTO EN NYÍREGYHÁZA

Kiel ekde multaj jaroj estas kutime, ankaŭ ĉi-jare okazis Zamenhof memorfesto en Nyíregyháza. La aranĝaĵon organizis la loka Esperanto-grupo „Verda Stelo”. La ĉeestantojn - kiuj krom la lokaj esperantistoj alvenis el diversaj regionoj de nia lando, eĉ el eksterlando – salutis Enikő Zengő Sereghyné. Post la salutvortoj la partoprenantoj de la memorfesto kantis la Esperanto-himnon. Sekve tion Miklós Zuberecz deklamis la hungaran tradukon de la himno.

Enikő Zengő Sereghyné prezentis la invititajn kaj ĉeestantajn gastojn de la aranĝaĵo. Unue, s-ron Stefan MacGill, la vicprezidanton de UEA, kaj s-ron, d-ron Gábor Márkus "A" komitatanon de HEA ĉe UEA.



*Partoprenantoj de la memorfesto*

Eksterlandaj gastoj alvenis el Rumanio el la urbo Szatmárnémeti (nun Satu Mare). Salutleteron sendis el Nagyvárad (nun Oradea) Stefano Budaházi. Enlandaj gastoj alvenis el urboj Budapest, Debrecen kaj Miskolc.

Miklós Zuberecz mallonge rememoris pri vivo kaj agado de Zamenhof, poste li raportis pri la movada agado kaj laboro de la Esperanto-grupo „Verda Stelo”. Li diris dankon al direktorino de la fervojista kulturdomo pro tiu helpo, kiun ŝi donis al la Esperanto-grupo, certigante la favorajn cirkonstancojn por la tutjara funkciado. Li menciis, ke la membroj de la grupo estis tre aktivaj, ili partoprenis diversajn en- kaj eksterlandajn aranĝaĵojn, ekzemple la Landan Fervojistan Amikan Esperanto-Renkontiĝon en Győr, kie partoprenis sep personoj el la grupo.

Stefan MacGill je la nomo de UEA salutis la ĉeestantojn. Li diris: “ Zamenhof donis al ni pli ol lingvon. Esperanto estas en unika malfacila pozicio, kompare kun la naciaj lingvoj. Kiu estas tiu malfacilaĵo? Ni mem devas kreskigi niajn novajn generaciojn, adeptitojn. Ĉe naciaj lingvoj tiujn taskojn plenumas la ŝtatoj per siaj rimedoj, kiel infanĝardenoj,

lernejoj, kaj la tuta eduka sistemo. Estas grava demando por ni, kiel konservi nian heredaĵon?” Poste li parolis pri la AMO- programo, en kies kadro oni organizis ok seminariojn en kvar kontinentoj. Li menciis kelkajn aranĝaĵojn, okazantajn en la estonto. Li gratulis al la lokaj esperantistoj, ĉar ili estos la gastigantoj de la ILEI-konferenco en 2016. En 2015 estos aranĝita la 100. UK en urbo Lillo, proksime al la loko de la unua, kiu okazis en Bulonjo sur Maro. Laŭ lia opinio la centa UK fermos iun historian periodon, kaj la sekva kongreso en Nitra – kiun aranĝos junularaj organizantoj – povos esti komenco de novtipaj kongresoj.



*D-ro József Halász salutas la ĉeestantojn*

D-ro József Halász salutas la ĉeestantojn je la nomo de HFEA. Li laŭdis la aktivan agadon de la grupo, kaj dankis tiun helpon kiun membroj de la grupo donis por HFEA okaze de ĝia aŭtuna translokiĝo. Dum la sekvaj jaroj la grupo havos tre gravajn kaj malfacilajn taskojn – kiel organizanto de ILEI-konferenco –


al kiuj li deziris multe da sukceso.

Salutas la ĉeestantojn Klára Szabó je la nomo de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo, kaj Kocsárd Valér Arató je la nomo de la Debrecenaj esperantistoj.

Sekve ilin D-ro Gábor Márkus, kiel “A” komitatano de HEA ĉe UEA, mallonge salutas la partoprenantojn je la nomo de HEA. Poste li per helpo de projekciitaj bildoj prezentis tiun nove fonditan budhistan universitaton en Koreio, kie li instruas lingvon Esperanto. Estis korvarmige aŭdi, ke en ĉi tiu universitato la lingvo Esperanto estas deviga, kreditdona studobjekto. Li spertis kaj la avantaĝojn, kaj la malavantaĝojn de tiu fakto, ke li estas fremdlingva instruisto de la universitato. Avantaĝo estas, ke la instruisto ne parolas la lingvon de la lando, do ekde la unua momento la studentoj devis uzi la instruitan lingvon. Malavantaĝo estis ĉe komenco de la kurso oni devis uzi simplajn frazojn. Lernolibro estis Esperanto por rekta metodo. Sed simple ĉi tiu libro ne estis uzebla ĉar ekzemple en Koreio oni ne konas la baptonomojn, uzatajn en Eŭropo. La studentoj ne sciis kiu el ili estas vira, kiu virina nomo. El la prezentado la ĉeestantoj ekkonis la universitaton, kaj ankaŭ la vivmanieron en tiu fora orienta lando. Per ĉi tiu interesa prelego la oficiala parto de la memorfesto finiĝis. Poste la membroj de la grupo prezentis mallongan esperantlingvan programon, kiun sekvis komuna fotado kaj amika babilado.

**D-ro József Halász**

# ADIAŬO DE JÁNOS PATAY



Granda perdo atingis la familion, geamikojn kaj la Esperanto-komunumon. Eterne forlasis nin János Patay ŝatata amiko kaj samideano. Li mortis post longa kaj dolora malsano la 30-an de januaro 2015.

Estas malfacile formuli niajn sentojn kaj paroli pri la nekrologo, kio estus inda al nia mortinto. Tamen mi provas fari adiaŭ-paroladon nur kun kelkaj pensoj, kaj mildigi la perdon de la landa kaj internacia Esperanto-komunumo.

János Patay naskiĝis la 18-an de februaro 1929 en Budapeŝto. Li estis fervojisto, kaj laboris en multaj terenoj de la Hungaraj Ŝtatfervojoj. Lia Esperanto-aktiveco estis longa kaj ekzemplodona. Ekde jaro 1964 li estis esperantisto kaj membro de la Hungara Esperanto-Asocio, kaj ekde 1969 li estis membro de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. En la jaro 1972 li iĝis membro de la Universala Esperanto-Asocio. Li agadis sur ĉiuj terenoj de la Esperanto-movado. Li estis dum dudekkvin jaroj sekretario de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio, komitatano ĉe la internaciaj kongresoj, li gvidis lingvokursojn plejparte por plenkreskuloj, sed ankaŭ en la Gimnazio Szent László, resp. en la Oficirkleriga Instituto de MÁV. Ekde 1972 dum pli ol dudek jaroj li ĉiĉeronis dum diversaj Esperanto-aranĝoj, kongresoj, krome li verkis artikolojn en fakaj, kulturaj kaj movadaj temoj. Li estis

kunlaboranto de nia faka revuo „Hungara Fervojista Mondo”, eĉ preskaŭ dum dek jaroj li estis ĝia redaktoro. Sennombre li prelegis dise en la lando pri faka, kultura, sporta, historia kaj movada temoj. Li estis sekretario de la Loka Kongresa Komitato de IFEF-kongresoj okazintaj en Hungario en la jaroj 1982, 1995, 2000, 2004. En la lastaj jaroj li estis membro de la Redaktora Komisiono de IFEF. Preskaŭ nebleco estas denombri la larĝajn aktivecojn, kiujn li faris sur ĉiu tereno de Esperanto.

Li ne konis limojn en la laboro. Ĉiam li klopodis fari perfektan laboron, liaj homaj rilatoj estis ekzemplodonaj. Tion montras la senditaj kondolencaj leteroj el pli ol 60 adresoj dise el la mondo. Laŭ tiuj leteroj kaj retmesaĝoj oni nomis lin klera, inteligenta, humana, lerta, sincera, senlaca, altruista, helpopreta, amikema, trankvila, sperta, fervora, atentema, kara kaj vera homo. Tiuj epitetoj ne estas nur esprimoj, sed ankaŭ verecoj. Tiujn epitetojn oni diras nur al veraj homoj. En la tuta mondo oni konis lin, eĉ ne nur fervojistaj esperantistoj.

Pro lia multflanka, efika kaj entuziasma agado li ricevis gravajn ŝtatajn kaj Esperanto-distingojn, inter ili en la jaro 1988 la distingon „Memormedalo de Hungara Esperanto-Asocio”, en 1992 „Pro Esperanto de HEA”, kaj en 2000 „Honora Membro de IFEF”.

János Patay forlasis nin. Mi estis kune dum multaj jardekoj en ĝojo kaj malĝojo, kaj nun tiu malĝojo estas tro profunda kaj korŝira. Lian mankon ni sentas eĉ sentos ĝis la fino de nia vivo. La memoro pri li restos ĉiam ĉe ni.

La Dio donu al Li eternan kvietecon, ripozu en Paco!

**István Gulyás**

# LABORPLANO DE IFEF (2014 – 2016)

*La estraro de IFEF kompletigis la laborplanon de IFEF, kiun dum la kongreso la komitato aprobis. Tiu strategia laborplano enhavas taskojn, por kiuj la estraro establigis sep laborgrupojn, kiuj – helpe de la du Komisionoj de IFEF – provas solvi la plej gravajn fendaĵojn sur la plej gravaj terenoj de la fervojista Esperanto-movado. Ĉar ĉiu landa asocio de IFEF estas interesita kunlabori kun tiuj laborgrupoj, ni konigas tiun kompletigitan laborplanon:*

La principoj de la nova **strategia laborplano de IFEF:**

- 1/ Estu adaptita al tiu de UEA (2013-2017) kaj kreita surbaze de la Statuto kaj la Regularo de IFEF;
- 2/ Kongruu al oficperiodo de la estraro;
- 3/ Ellaboru subplanojn por ĉiu organiza jaro, ekz.:  
2013 -2014; 2014-2015; 2015-2016
- 4/ Por plibonigi la organizan kernon - krom Faka Komisiono kaj Redaktora Komisiono - starigi novajn laborgrupojn, kiuj okupiĝu pri la ĉefaj agadkampoj kaj trovu aktivulojn, kiuj estas pretaj kunlabori en tiuj laborgrupoj.
- 5/ Uzu la nunajn ankoraŭ fortojn en teamoj kun novuloj, por transdono/transpreno de informoj kaj interŝanĝo de spertoj, cele pretigi novan generacion de aktivuloj.
- 6/ La respondeculoj de tiuj laborgrupoj konservu ankaŭ la nunajn taskojn, kaj nepre prizorgu konstantan komunikadon je ĉiuj niveloj.

## Taskoj de IFEF

### *1./ Levi la prestiĝon de la internacia lingvo Esperanto*

- Instigi la landajn asociojn de IFEF por aranĝi diversnivelajn lingvokursojn;
- En la kadro de la terminara kaj faka agado kontinue evoluigi kaj disvolvi la fervojfakan lingvon por estonta pli klara kompreniĝo inter diverslandaj fervojistoj;
- Helpi la agadon de ILEI;
- Progresigi kaj subteni la fakan laboron per fakaj artikoloj, fakprelegoj, „Fervojfakaj Kajeroj” ktp;
- Progresigi kaj subteni la terminaran laboron kunlabore kun UIC;
- Kontinue partopreni en la laboro de la modifo kaj kompletigo de PIV.

### *2./ Fortigi la kunlaboron kun instancoj kaj aliaj organizoj*

- Plibonigi la interrilatojn kun la fervojaj instancoj kaj aŭtoritatoj;
- Kunlabori kun UIC, ĉefe sur la tereno de la terminara agado;
- Fortigi la kunlaboron kun FISAIC, partopreni en multaj FISAIC-aranĝaĵoj kaj kunvenoj, instigi la uzadon de Esperanto kiel oficiala laborlingvo de FISAIC;
- Kontinue interrilati kun UEA ĉefe pere de la Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA;
- Estigi la interrilaton kun la SAT-organizaĵo;
- Strebi kontaktojn kun aliaj fakaj asocioj – kiel jam okazadas kun la medicinistoj (UMEA), la instruistoj (ILEI) kaj la sciencistoj (ISAE) – helpe de la respondeculo de la fakaj agadoj de la estraro de UEA; havu delegiton por Internacia Scienca Asocio Esperanta (ISAE)
- Instigi la landajn asociojn por kunlabori kun la landaj Esperanto-asocioj kaj kun la landaj FISAIC-organizoj.

### *3./ Plilarĝigi la informadon kaj la organizan laboron*

- Disvastigi la informojn pri Esperanto kaj pri IFEF;
- Informi la landajn asociojn pri la estrarkunsidoj de IFEF, kaj pri aliaj gravaj eventoj;
- Regule eldoni – po jaro sesfoje – la fakan revuon „Internacia Fervojisto” por aperigi fervojfakajn artikolojn, interesajn raportojn pri kongresoj, konferencoj kaj aliaj Esperanto-eventoj;
- Plialtigu la procenton de reta sendado de IF; la Redaktora Komisiono kunlaboru kun ĉiuj laborgrupoj por ricevi informojn;
- Korekti, pliampleksigi kaj kontinue renovigi la retpaĝon de IFEF;
- Establi retan liston pri la membraro de IFEF;
- Instigi la landajn asociojn por aranĝi ekspoziciojn pri la Esperanto-movado;
- Fortigi la membraran bazon de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, pro tio la estraro, la komitato kaj la landaj asocioj kunlaboru tiel, ke la gejunuloj volonte venu al nia Federacio;
- Instigi la landajn asociojn por organizi IFEF-kongreson;
- Flegi aktivajn kontaktojn al la ekstermovada publiko dum la IFEF-kongresoj;
- Aranĝi fakekskursojn dum la fervojistaj kontaktkunvenoj en la kadro de la Universalaj Kongresoj;
- Por kompletigi kaj finprepari la historion de IFEF, la estraro instigu la landajn asociojn por doni sciigojn, materialojn, indikojn pri la landa historio, por katalogi kaj kompletigi la Esperanto-bibliotekojn, por registri la landajn Esperanto-heredaĵojn, kiuj troveblas sur la tereno de la fervojo.

### **Taskoj de la landaj asocioj**

#### *1./ Levi la prestiĝon de la internacia lingvo Esperanto*

- Aranĝi lingvokursojn por komencantoj kaj progresantoj, eĉ konsidere la faka lingvo;
- Zorgi la instruadon en faklernejoj, fakultatoj pri transpotoj;
- Daŭrigi la aktualajn taskojn en la kadro de la fake aplika kaj de la terminara laboroj, kaj pere de la respondeculoj de la landaj asocioj aktive partopreni en la laboroj de tiuj;
- Regule organizi klubkunvenojn kun lingvokursoj, konversacioj kaj aliaj programoj, kaj partopreni en la agadoj de la fakgrupoj.

#### *2./ Fortigi la kunlaboron kun instancoj kaj aliaj organizoj*

- Plibonigi la interrilatojn kun la fervojaj instancoj kaj aŭtoritatoj, kun la fervojistaj sindikatoj, kun la landaj FISAIC - asocioj kaj aliaj nefervojistaj organizoj;
- Plibonigi la interrilatojn kun la landaj asocioj de UEA, kun landaj grupoj de SAT, kaj kun aliaj Esperanto-organizo;

#### *3./ Plilarĝigi la informadon kaj la organizan laboron*

- Kolekti gravajn informojn rilate al Esperanto ĉe fervojo, kaj sendi ilin al IFEF;
- Informi fervojajn administraciojn kaj sindikatojn pri la agado de la fervojistaj esperantistoj;
- Informi la landajn asociojn de FISAIC pri la laboro de la landaj asocioj de IFEF;
- Informi la landajn kaj lokajn radio- kaj televidstaciojn pri gravaj eventoj de nia laboro;
- Informi la landajn kaj lokajn ĵurnalojn, kaj doni al ili intervjuojn kaj interesajn artikolojn pri la vivoj kaj agadoj de niaj landaj asocioj;

- Informi la vojaĝantojn kaj la fervojistojn pri Esperanto pere de flugfolioj, afiŝoj, murgazetoj kaj informtabuloj;
- Aranĝi ekspoziciojn pri la fervojista Esperanto-agado, kaj pri aliaj Esperanto-eventoj;
- Establi retan liston pri la membraro de la landaj asocioj de IFEF, kaj regule sendi tiun al IFEF-estraro;
- Plialtigi la membronombron krom fervojistoj kun parencfakuloj (navigacia, aertrafika, ŝosea, urbotrafika, poŝtista ktp);
- Organizi junularajn aranĝojn en la kadro de la klubkunvenoj kaj de aliaj renkontiĝoj;
- Inviti gejunulojn kaj neesperantistojn al la aranĝitaj ekskursoj enlande, eĉ eksterlande, por ke ili spertu dumvoje la utiligon de la lingvo Esperanto;
- Eldoni propran organon aŭ periodaĵon, kaj sendi al IFEF-estraro, precipe al la Redaktora Komisiono de IFEF;
- Doni sciigojn, materialojn, indikojn al IFEF pri la landa historio de la fervojista Esperanto-movado por kompletigi kaj finprepari la historion de IFEF;
- Katalogi kaj kompletigi la Esperanto-bibliotekojn;
- Registri la landajn Esperanto-heredaĵojn (esperantaĵojn, memortabulojn, monumentojn ktp), kiuj troveblas sur la tereno de la fervojo.

### **Taskoj de la Faka Komisiono, de la Redaktora Komisiono kaj de la komitatano "A" de IFEF ĉe UEA"**

#### *1./ Fake Aplika Sekcio de la Faka Komisiono*

- Zorgi por lingve korektaj fakprelegoj;
- Verki kaj aperigi fakajn artikolojn en la faka revuo „Internacia Fervojisto”
- Organizi fakprelegojn kaj „fervojajn aktualaĵojn” en la kadro de IFEF-kongresoj;
- Interesigi al tradukado de fakprelegoj en naciaj lingvoj;
- Regule eldoni „Fervojfakajn Kajerojn” pri gravaj fakaj artikoloj, prelegoj;
- Helpi al la Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA organizi fervojistan kontaktkunvenon kun fakprelegoj kaj fakekskursoj dum la Universalaj Kongresoj.

#### *2./ Terminara Sekcio de la Faka Komisiono*

Kunlabori en la Terminologia Grupo de UIC laŭ oficiala korespondanteco; Tradukado de difinoj aperintaj en la UIC-terminaro "RailLexic";

- Periode eldoni komunikilon "Terminara Kuriero";
- Pridiskuti rete, letere kaj kunside plej taŭgajn terminsolvojn laŭ difino kun finaj decidoj en kongresaj kunsidoj;
- Enigi la rezultojn en la datenbankon de "RailLexic";
- Zorgi pri ebloj, ke kunlaborantoj kaj aliaj interesatoj havu aliron al la datenbanko;
- Kunlabori kun la redakcio de PIV, por laŭbezone modifi kaj kompletigi fervojajn terminojn kaj difinojn;
- Revizii fervojfakajn tekstojn koncerne deciditajn terminojn;
- Prezenti ĝenerale interesajn terminologiajn rezultojn en la faka revuo "Internacia Fervojisto".

#### *3./ Redaktora Komisiono*

- Prizorgi la eldonadon de la federacia organo „Internacia Fervojisto” konforme al la celoj de la Federacio;
- La revuo IF estu redaktata laŭ la fundamentaj principoj de IFEF, kaj la „Ĝeneralaj Gvidlinioj”;

- Po 6 numerojn de la revuo eldoni jare, unuope po 20 paĝoj;
- Klopodu aperigi multajn artikolojn pri fakaj, movadaj kaj kulturaj temoj;
- La revuo enhavu interesajn artikolojn pri kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj kun fotoj;
- La revuo estu belaspekta, riĉenhava, la artikoloj estu interesaj sen gramatikaj kaj presejaj eraroj;
- Kunlabori kun ĉiuj novaj laborgrupoj por ricevi informojn pri ĉiuj agadkampoj;
- Plialtigi la procenton de rete sendado de la revuo.

#### 4./ Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA

- Reprezenti la fervojistajn esperantistojn kaj IFEF ĉe UEA;
- Organizi kaj gvidi fervojistan kontaktkunvenon dum la Universalaj Kongresoj;
- Partopreni en la komitatkunsidoj, en la fakaj kaj terminologiaj aranĝaĵoj, en la strategia forumo kaj en la „faka kaj scienca” subkomitata laboro dum la Universalaj Kongresoj;
- Eventuale prelegi en la kadro de la „Kleriga lundo” dum la Universala Kongreso;
- Raporti skribe kaj buŝe pri sia agado al la komitato de IFEF dum la IFEF-kongreso.

#### Proponoj por novaj laborgrupoj:

##### **- Laborgrupo pri Statuto de IFEF**

##### **- Laborgrupo pri instruado**, laŭbaze de la kunlabora interkonsento kun ILEI

- trejnado de instruistoj
- kursoj kaj ekzamenoj
- perretaj kursoj
- internaciaj staĝoj
- aparta programero kadre de IFEF kongresoj

##### **- Laborgrupo pri eksteraj rilatoj de IFEF:**

- UEA - aktiva partopreno en la diskutlisto de la Komitato de UEA, kies dosierujo FA2011-12.xlsx. estas bazo por pli konkreta traktado de perreta Faka Agado de UEA
- anoncoj ĉe Gazetaraj Komunikoj de UEA
- revuo Esperanto
- Interkultura Centro Herzberg (ICH)
- ISAE, TEJO, EEU, UMEA, SAT, ILEI
- amantoj de fervojo

##### **- Laborgrupo pri rilatoj interne de IFEF:**

- inter LA
- inter LA kaj aliaj enlandaj instancoj (ministerioj, sindikatoj, aliaj organizaĵoj, lokaj kluboj, Universitatoj)
- inter LA kaj Landaj Sekcioj de FISAIC
- iniciati kaj helpi en la organizo de novaj LA
- tutmondiĝo de IFEF; subteno de novaj ekstereŭropaj asocioj aŭ sekcioj

##### **- Laborgrupo pri historio kaj arkivo de IFEF:**

Krom kolekto de dokumentoj, la teamo kontribuu al kapabligo de volontuloj en tiu kompetenteco.

Bona okazo por subteni la partoprenon de kelkaj niaj membroj povus esti:

***KAEST 2014 (15-a ĝis 16-a de novembro), Modra, Slovakio: temo :  
"Arkivoj kaj bibliotekoj — kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon***

### **- Laborgrupo pri modernigo de informado en nuna reta epoko:**

- proponi kaj subteni junulojn por partopreni staĝojn de E@I, kiuj celas kunuzeblon de Esperanto kaj interreto
  - plibonigo de la retlisto de IFEF per ampleksa datenbazo de la retadreso
  - ĝisdatigita retadresaro de IFEF
  - delegita reto kun faka angulo
  - diskutlisto; perretaj kunsidoj de la laborgrupoj
  - reta revuo pli vaste diskonigita
  - perreta koresponda servo
  - Vikipedio: ĝisdatigi, plibonigi, krei novajn paĝojn
  - perretaj kontaktoj ene de fervoja medio (ministerioj, FISAIC), kaj ekstere (gazetaro, radio- kaj televidelsendoj, aliaj organizaĵoj: TEJO, transportistoj).

### **- Laborgrupo pri financado de projektoj**

- teamo kun spertuloj pri subvenciaj programoj por ebligi **diversspecajn projektojn** pri instruado, trejnado kaj serĉado, kun rilato al nia faka agado (kunlaboro kun EEU, ESF, Eŭropuniaj programoj "La Tutviva lernado - Grundtvig – Partnerado", "Erasmus+", ktp),
- uzi fondusojn por subteni instruadon kaj stariĝon de novaj LA,
- subteni komunajn fakajn projektojn naciaj, translimaj, interregionaj kaj internaciaj, proponitaj de diversaj laborgrupoj.

### **Ĉiu laborgrupo havu :**

- respondeculon,
- membrojn, kiuj estas pretaj kunlabori,
- konkretajn taskojn, kiuj kongruas kun tiuj de Statuto,
- difinitajn limdatojn por plenumi la taskojn,
- rimedojn por kunlabori.

### **Subplanoj:**

#### Subplano por 2013-2014

- krei kaj funkciigi la laborgrupojn
- diskonigu ilin je nivelo de IFEF kaj aliaj instancoj
- trovi kunlaborantojn en diversaj medioj

#### Subplano por 2014-2015

- krei kaj subteni konkretajn projektojn
- kunagadi por ilia realigo

#### Subplano por 2015- 2016

- bilanci la sukcesojn aŭ malsukcesojn;
- investi en novaj projektoj

### **La estraro de IFEF**

*Tiun strategian laborplanon la estraro de IFEF detale traktis dum la aŭtuna estrarkunsido en Prago, kaj daŭrigos la traktadon en la printempa estrarkunsido de IFEF en la franca urbo Dijon. Ĉar la solvo de tiu tasko estas la plej grava en la vivo de IFEF, la estraro invitis la komitatanojn al la plivastigita printempa estrarkunsido, por ke ankoraŭ antaŭ la IFEF-kongreso ni povu decidi pri la plej gravaj fendaĵoj. Ankaŭ la hungaraj fervojistaj esperantistoj povus helpi en la solvo de la taskoj, se ni plenumis la entreprenitajn taskojn laŭ nia ĉijara agadplano. Do ek al la laboro.*

**István Gulyás**

## El fervoja mondo

### Britio: **Urboj en Britio planas Nordan projekton**

La urboj *Liverpool*, *Manchester*, *Sheffield* kaj *Newcastle* anoncis investi 10-15 miliardojn da britaj pundoj cele plibonigi trafikan infrastrukturon. Baza branĉo de t.n. Norda projekto estas fervoja trafiko. La projekto celas pligrandigi kapaciton kaj redukti tempon por vojaĝado inter tiuj ĉi urboj. Rapido meza de trajnoj inter ili nun estas 64 ĝis 92 km/h. Trajnoj inter *Sheffield* kaj *Leeds* nove povos trafiki per rapido 200 km/h, kaj la fervoja linio havos koneksojn al fervojaj linioj al *Manchester* kaj *Liverpool*. Post finkonstruo la kapacito povos kreski je 150 procentoj kaj vojaĝtempo estos reduktita je duono. En la plano estas ankaŭ aliaj fervojlinioj al *Newcastle*, sur kiuj trajnoj povos trafiki per rapido ĝis 225 km/h.

### Ĉeĥio: **Ŝaka trajno denove trafikis**

Speciala trajno, dum kies veturado okazis ŝakturniro, en oktobro 2014 traveturis elektitan kurson tra meza Eŭropo jam kvaran fojon. Tiun ĉi fojon ĝi veturis el Praga ĉefa stacio al Vieno, Budapeŝto, *Trenčín* (en Slovakio) kaj Krakovo, kaj post pr. dumil kilometroj kaj dekdu plenumitaj ŝakturniraj rondoj revenis en la veturkomencan stacion. En kvar tagoj en la trajno streĉe batalis amatoraj kaj profesiaj ŝakistoj el dek ses landoj, inter alia el Brazilo, Aŭstralio, aŭ Saudi-Arabio.

Komence temis pri subita intenco de kelkaj entuziasmegaj ŝakistoj, kiuj sidante sur noktamuzaj sidiloj dum unu el ŝakturniroj prezentis siajn proponojn serĉi originalan lokon por tiu ĉi ludo de la reĝoj. „Okazis tio en jaro 2009 en baneja urbo *Mariánské Lázně*, kie ni ekposedis ideon aranĝi turniron en la trajno *Orient-Express*. Post malebriiĝo ni forlasis sopiron pri plej luksa trajnkurso, netradicia agadkampo

tamen ne ĉesis alparoli nin“, revenas al komenco de la projekto *Pavel Matocha* el Praga ŝaka kompanio. Daŭris tio pluajn du jarojn, la revo fine tamen estis plenumita. En oktobro 2011 Ŝaka trajno ekveturis, kiel ĝis tiam nevidata origina aranĝo, unuan fojon. Pasis tri jaroj, kaj el ĉeĥa subita intenco fariĝis ŝakluda tradicio kaj fenomeno.

### **Forgesi pri nigrablanka**

La Ŝaka trajno (2014) ekveturis el Praga ĉefa stacio 10-an de oktobro, tirata de lokomotivo kun speciala ŝaktema simbolo. Kunligo de ŝako kaj Ĉeĥaj Fervojoj (ĈD), kiu estas tradicia ĝenerala partnero, estis unuavice videbla rekte en ludvagonoj, nomigitaj laŭ plej konataj personoj de ŝaka historio. Dum veturo el Prago al Vieno, Budapeŝto, *Trenčín* kaj Krakovo okazadis streĉaj dueloj sur blu-blankaj ŝaktabuloj, kaj kun bluaj kaj blankaj figuretoj. Ofte temis pri dueloj vere nekompromisaj. En la trajno ja vojaĝis kvar ŝakaj grandmajstroj. Krom



legenda ĉeĥa grandmajstro *Vlastimil Hort* (regula partoprenanto), kaj ĉeĥaj grandmajstroj *Martin Petr* kaj *Petr Neuman*, el Aŭstralio venis speciale por Ŝaka trajno *Ian Rogers*, kiu post kvar tagoj kaj dekdu rondoj de la turniro fariĝis absoluta venkinto.

### **Iomete alia libertempo**

Vojaĝo sur trakoj tra meza Eŭropo tamen ne fariĝis nur taktiko super ŝaktabuloj. „Krom 76 partoprenantoj en

la ŝakturniro ja vojaĝis pliaj 50 pasaĝeroj de akompanantaro, kiuj komprenis Ŝakan trajnon kiel eblon kunligi hobion de siaj proksimumoj kun sia plaĉo en vojaĝado, temas pri tiu netradicia formo de libertempo“, priskribas sian plian opinion pri unika projekto *Pavel Matocha*. Kaj pri vojaĝtravivaĵoj vere ne estis manko, ekzemple en ambaŭ metropoloj apud Danubo, dum suprenirado al kastelo super *Trenčín*, aŭ dum promeno sur placoj en Krakovo. La projekto, kiu en la mondo ne havas analogan komparon, tial denove konfirmis, ke ŝako kaj fervojo apartenas unu al la alia, ol oni unuavide opinius. Kaj pro tio ĉesigo de Ŝaka trajno ne minacas ankaŭ en la jaro 2015. Cetere, preparo de la aranĝo por la jaro 2015 jam komenciĝis.

#### **Danio: Veturilnombroj por novaj trajnoj el Kopenhago estas taksataj**

Nacia trafikisto *DSB* sendis al dana registaro taksojn pri granda de veturilstoko, kiu estas bezonata por plenumo de strategio *Togfonden DK*. Tiu ĉi celas eluzi depagojn por ekspluatado de hidrokarbono, kaj povos financi elektrizon kaj aliajn laborojn en infrastrukturo, ke eblus atingi kadencan veturadon inter la plej grandaj danaj urboj. Raporto enhavas sep eblajn variantojn, kiuj dependas de decidoj de tia formato, ekzemple, ĉu maksimuma rapido de trajnoj estu 200 km/h aŭ 250 km/h, aŭ ĉu estu preferataj rektaj trajnoj, aŭ kunligaj trajnkonektoj. Ĝis la jaro 2030 kapacito de sidlokoj en trajnoj povus kreski je 25 procentoj, por atingi supozatan kreskon de personkilometroj je duono.

#### **Francio: Leĝdona ŝanĝo por nacia holdingo**

Franca senato aprobis ferman tekston, akceptita de parlamenta komitato por propono de leĝo pri fervoja reformo. Temas pri lasta paŝo, bezonata por

akcepto de tiu ĉi leĝo. La propono estis akceptita de 189 senatoroj; 150 estis kontraŭ. Nova leĝdono komencis validi ekde 1-a de januaro 2015 kaj ĝi kunligas Francajn Naciajn Fervojojn (*SNCF*) kaj francan ekspluatanton de fervoja infrastrukturo *RFF* en nova holdingo. La leĝdono solvos ankaŭ kontrolon pri fervojaj ŝuldoj. Laŭ franca trafikministro *Frédéric Cuvillier* tamen ne temas pri lasta reformo de fervoja sektoro.

#### **Mongolio: Partnereco kun Rusio alportos novajn fervojajn liniojn**

La 3-an de septembro 2014 estis subskribita interkonsento pri strategia partnereco kun Rusaj Fervojoj (*RŽD*), kiu startos evoluon de mongolaj fervojoj en Ulanbatoro. Ĝis marto 2015 estas interkonsentitaj precizaj kondiĉoj kaj nomigitaj konsilistoj, kiuj preparas financajn kaj teknikajn studojn por efektivigi modernigon kaj konstruajn projektojn. Al ĉefaj pripensataj projektoj apartenas modernigo de traceado en direkto nordo – sudo 1100 km longa el *Sühbaatar* apud rusa landlimo ĝis *Dzamĭn Üüd/Erenhot* apud landlimo Mongolio/Ĉinio, inkluzive de elektrizo, kaj/aŭ konstruado de dua trako. En okcidento de Mongolio krome estas planata ankaŭ konstruado de fervoja linio, kunligonta Rusion kaj Ĉinion por eksporto de rusaj varoj en Ĉinion, Hindan Union, Pakistanon kaj aliajn landojn en sudazia regiono (kaj aliadirekte).

#### **Saudi-Arabio: Hispanoj preparos planon por grandrapida linio el Riado**

Konsorcio, gvidata de hispana firmao *Consultrans*, subskribis komence de septembro 2014 kontrakton en valoro 6,6 milionoj da rialoj (ĉirkaŭ 1,4 milionoj da eŭroj) por prepari studon pri eblo konstrui grandrapidan fervojan linion Riado – *Dammam*. La studprojekton mendis saud-arabia

organizo por fervoj (SRO), kaj ĝi proponos traceojn, teknikajn postulojn kaj potencialan enspezon el fervoja linio, konvena por elektra trajno, trafikantaj per rapido 300 ĝis 350 km/h. SRO supozas, ke veturtempo 90 minutoj (ĝis nun 260 minutoj) povos instigi vojaĝantojn estonte uzi prefere fervojon ol aertrafikon.

Nederlando: **Lokomotivo Traxx F160 MS anstataŭos motorvagonojn Ansaldo Breda**

Unua el deknaŭ elektra lokomotivoj Traxx F160 MS, kiuj estas produktitaj

Transportation en Kassel por trafikisto NS Reizigers, venis en aŭgusto 2014 el Amsterdamo. La lokomotivoj por rapido 160 km/h estos trafikuzataj kun modernigitaj pasaĝervagonoj ICR sur enlandaj fervojaj linioj el Amsterdamo al Roterdamo kaj Eindhoven, kun uzo de grandrapida fervoja linio HSC-Zuid ekde la unua duono de la jaro 2015. Ili estis menditaj rekte ĉe entrepreno Bombardier sen konkurso en 2013, post kiam NS rezignis pri sia programo enkonduki en trafikadon la motorvagonojn Ansaldo Breda V250.

Kompilis: **Jindrich Tomísek**  
Reviziis: **Heinz Hoffmann**

## ESPERANTO KIEL FAMILIA LINGVO

Mi legis en la Fejsbuko-paĝo de la hungara „Esperanto-Fonduso” interesan sciigon, kiu aperis rilate al la „Tago de gepatra lingvo”, kiu okazis la 21-an de februaro. Jen la sciigo:



„Multfoje okazas, ke pere de Esperanto estiĝas konatiĝo, kiu rezultas geedziĝon. En tiuj miksedziĝoj – sekvante la vojon de la plej facila solvo – en la familia rondo oni uzas la lingvon Esperanto, kaj la naskiĝintaj infanoj aŭtomate eklernas ĉi tiun lingvon. Por ili la Esperanto estas speciala 'familia komunika lingvo' krom la aliaj parolantaj lingvoj. Tiuj infanoj kompreneble parolas tiun lingvon, en kiu

lando ili vivas, kaj ili ofte alproprigas la originalajn lingvojn de la gepatroj. La nocio kaj nivelo de la 'familia lingvo' ne estas sama kun la tradicia 'gepatra-nivela lingvoscio', ĉar tiu koncernas la teronon de la persona interrilato, sed por tiu komunumo same estas grava, ja tio apartenas al ilia propra personeco. Tiuj familioj, kiuj uzas la Esperanton en familia rondo ĉiujare renkontiĝas kaj komune ferias. La ĉijara aranĝo 'Renkontiĝo de Esperanto-Familioj, REF' okazos en Hungario inter la 15-a kaj 26-a de julio en la urbo Esztergom (Esztergom-Búbánatvölgy).”

Tiu sciigo estas ege interesa ankaŭ por la fervojistaj esperantistoj, ĉar mi konas multajn tiujn miksedziĝojn inter la fervojistoj (ĉina-franca, japana-aŭstra, bulgara-germana, hungara-franca, pola-hungara, ĉeĥa-pola, hungara-germana ktp), kiuj en familia rondo parolas nur Esperante. Mi esperas, ke kelkaj fervojistaj geedzaj paroj partoprenos en tiu renkontiĝo.

**István Gulyás**

# STADLER FLIRT EN ESTONIO

En junio 2013 ni vizitis unufoje Estonion. La fervojreto en Estonio aspektas tiel:



Ĉefe fervojtransporto en Estonio estas vartransporto, precipe al kaj de Rusio. Ne veturas tro multaj pasaĝertrajnoj, la plimulto sin transportas (se temas pri publika transporto) per tre komfortaj aŭtobusoj inter la grandaj urboj.

Ni insistis provi veturi per trajno, kaj ni aĉetis biletojn por la vojaĝo Tallinn – Tartu. La vojaĝo daŭras du horojn pli-malpli, kaj la trajna interno aspektis tiel:



Estis kvazaŭ fari ĝi infano denove!

Oni rakontis al ni, ke jam en la daŭro de la jaro novaj trajnkompletoj veturu sur la estonaj linioj, kaj estonte oni intencas pli akceli kaj plivastigi fervojan pasaĝer transporton.

Jam en septembro, kiam mi denove vizitis Estonion, la novaj trajnoj alvenis!

La Estonaj Fervojoj AS Eestiliinirongid (Elron) aĉetis ĉe Stadler Bussnang AG en Svisio trajnkompletojn por la elektrizita ĉefurb-regiona trafiko ĉe Tallin kaj ankaŭ



*La nova trajnkompleto*

dizelajn trajnkompletojn por la landa interurba trafiko; entute 18 elektrajn kaj 10 dizelajn trajnkompletojn Elron ricevu ĝis la fino de 2014. La aĉeton oni aranĝas per 'prunt-kontrakto', tiel ke la estona ŝtato pagu ĉiujare 5,5 milionojn EUR, kaj post 20 jaroj la tuto estas posedaĵo de Estonio.

Ĝis nun estis renovigitaj kelkaj stacidomaj kajoj por kongrui kun la novaj, modernaj trajnkompletoj (ni vidis jam en junio 2013 survoje al Tartu). La renoviga laboro daŭrigas.

**Lene kaj Jan Niemann**

Fontoj: Vikipedio

Nordisk Jernbanenyt 2010 kaj 2012

Fotoj: Vikipedio  
Jan Niemann  
Lene Niemann



**János Patay kun aŭstroj antaŭ 30 jaroj en Salzburgo  
Tiuĵ belegaj jaroj...**



**La 67-a kongreso de IFEF okazos de la 16-a ĝis la 23-a de majo  
2015 en Ĉinio en la urbo Kunming.  
Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de HFEA.**